



INFORMILO 9

SEPTEMBRO 2023 Kol. 459/39

XX

Enhavo: Vizito de slovaka Esp. kongreso Rezolucio de la 108-a UK,
Renkontiĝo en Hranice, Novaĵoj de KAVA-PECH,
UEA sukcesas ĉe Erasmus, Mesaĝo de UEA okaze de E-tago
XX

VIZITO DE SLOVAKA KONGRESO

La antaŭlastan semajnfino de junio okazis en la slovacia urbo Nová Dubnica la kongreso de SKEF (Slovacia Esperanto Federacio). La urbo mem estas sidejo de la organizacio. Krom slovakaĵoj esperantistoj venis ankaŭ ĉeĥaj, kiuj estis fratece kore akceptitaj.

La kongreso okazis en malgranda, agrabla hotelo Dynamic, kie „sub unu tegmento“ situis la konferenca salono, la loĝigo kaj la manĝejo kun apuda stardrinkejo.

Jam la unuan tagon, vendrede, komenciĝis oficiala programo. Juna belga esperantistino prelegis pri kosmo.

Sed antaŭ tiu ĉi prelego kelkaj ĉeĥaj esperantistoj, fakte anoj de ĈEA, laŭ invito de Peter Baláž, (prezidanto de SKEF), vizitis novan laborejon de tiu ĉi organizacio. Tie troviĝas multaj E-materialoj, libroj, kompreneble komputiloj.... Antaŭ la slovakaĵoj esperantistoj staras granda tasko: ĉion ordigi, fari sistemon en la aĵoj. Oni petas kompleksajn homojn por helpi. Ĉu iu de vi, legantoj, emus veni al Nová Dubnica kaj helpi ordigi librojn kaj materialojn en la nova laborejo de SKEF? Fine de la vizito oni

fotografis la vizitan-tojn ĉe papera „statuo“ de Zamenhof. Post la vendreda vespermanĝo daŭris la programo, dum kiu Leonka Chaloupková kaj Pavol Petřík prezentis 5 el la plej novaj libroj de eldonejo KAVA-PECH. (Petro Chrdle, la eldonanto, pro sia malsano ne povis persone partopreni la kongreson).



Temis pri 3 libroj - *Sadako volas vivi*, *Bluaj neĝoj* kaj *Mia vivo kun Esperanto* (interesa biografio de Petro Chrdle pri si mem) kaj 2 libroj de religia temo - *Jarsezonoj kaj festotagoj per okuloj de bestoj* kaj *Ekster la limo*. Ĉiuj ĉi libroj kaj interesaj, kaj legindaj, estas aĉeteblaj rete ĉe adreso www.kava-pech.

Sekvis esperantlingva parolado de ĉeĥa sinjoro Jiří Altior, neesperantisto. La prelegon li kompilis en la ĉeĥa kaj per googla traduko prezentis en Esperanto! Nekredeble! La paroladon li (kompreneble) legis de komputilo kun bona prononco, bona akcento, bona esperanta esprimado. Sinjoro Altior estas fondinto de Instituto de Konservo de Kultura Heredaĵo, kaj tio krom aliaj projektoj - Esperanto sendube estas. Li parolis pri intencoj kaj planoj de la Institucio, pri sia konatiĝo kun Esperanto - ja en lia pasintparencaro figuras la eminenta esperantisto, poeto, filantropo, dr-o Stanislav Schulhof (1864-1919) el Pardubice. Grava estas la fakto, ke inter la google-tradukilo estas envicigita Esperanto, kaj ke la projekto funkcias preskaŭ perfekte. Sabate, la duan tagon, komenciĝis la programo per varma saluto

de estimata UEA-prezidanto Duncan Charters (de la ekrano).

Sekvis salutoj de ĈEA kaj de aliaj institucioj.

Slovakaj esperantistoj informis nin pri agado de siaj kluboj. Estis elektita nova, fakte malnov-nova komitato de SKEF. Peter Baláž denove iĝis prezidanto.

Post kafopaŭzo la kongres-ĉeestantoj trairis la urbon al la domo, antaŭ kiu okazis solena renkontiĝo: estis malfermita **Biblioteko kaj arĥivo de Ján Vajs**, (la elstara slovaka esperantisto, bedaŭrinde jam forpasinta). Salutparolis reprezentanto de la urbo, oni senvualigis memortabulon de Ján Vajs sur muro de la Biblioteko; kiam oni disdonis la rubandon antaŭ la pordo, la enirintaj esperantistoj vidis belan, helan spacon kun multaj libroj kaj diversaj materialoj. La enhavo de la biblioteko kaj arĥivo ekestas paŝon post paŝo.

Post trarigardo de la biblioteko sekvis tosto-ceremonio en apuda restoracio.

Posttagmeze okazis ekskurso al la proksima urbo Trenčín. Tie oni vizitis kastelon kaj ankaŭ hotelon, de kies granda fenestro estas videbla fama romia surskribo sur roko. La surskribo devenas de la jaro 179 kaj informas pri la venko de la II-a romia legio super ĝermanoj. (Ĝi markas la invadon de romianoj en la landon; fakte ĝi estas historia raraĵo).

Estis mirinde, kiel rapide ŝanĝiĝis la vetero. Vendrede varmego, sabate malvarme, malagrabla vento. Tamen la ekskurso plaĉis al ĉiuj.

Post la sabata vespermanĝo okazis neformala programo – restado en „konferencejo“ kaj apuda stardrinkejo kun babilado kaj kantado ĉe gitaro.

La juna slovaka esperantisto Kubo F. Hromoslav prezentis novan interaktivan ludon kun E-vortoj kaj ties ĝusta traduko

pere de saltado sur ludo-tabulo sur la tero. Ne estas facile klarigi la regulojn, oni devas mem provi la interesan ludon.

Dimanĉe daŭris la programo de la kongreso. Doktoro Košecký informis nin pri sia volum-kompilo de nova Esperanto-slovaka kaj Slovaka-Esperanto vortaroj. Pasis 53 jaroj de ilia lasta eldono. Kubo F. Hromoslav sciigis la partoprenantojn pri nova maniero ĉe uzo de poŝtelefono. Oni diktas tekston kaj la telefono transformas ĝin je skribaĵo.

Peter Baláž rakontis pri novaĵoj de lia projekto [E@I](#), pri venonta UKo en itala Torino 2023 kaj UKo 2024 en afrika lando Tanzanio, nome la urbo Aruŝa.

Milan Kolka, prezidanto de E-klubo de Brno, informis nin pri E-studoj ĉe universitato en Poznano kaj prezentis sin ankoraŭ kelkaj aliaj esperantistoj.

La programo de la kongreso estis riĉa kaj interesa. Manifestiĝis valora kunlaboro de slovakaj kaj de ĉeĥaj esperantistoj, kiu certe daŭros, kaj tio estas la plej grava „rezolucio“ de la renkontiĝo!

De la 28-a de septembro ĝis la 1-a de oktobro okazos konferenco de nia, ĉeĥa E-asocio. Estas invitataj ĉiuj esperantistoj al bela moravia turisma restadejo Prudká ĉe Tišnov, proksime de Brno.

Bonvolu aliĝi, bonvolu veni. La aliĝilon por la aranĝo vi trovos je retadreso www.esperanto.cz.

La programo enhavas ludojn, amuzan E-kurson, kantadon, ekskursojn al familia fervojeto kaj al la kastelo Pernštejn, societatan vesperon kun muziko kaj danco ktp. Sabate antaŭtagmeze okazos kunsido de la partoprenantaro, kiam estos pritraktataj gravaj temoj de nia asocio!

Oni atendas ĉeeston de eksterlandaj esperantistoj.

Bonvolu aliĝi, bonvolu veni!

L. Chaloupková, kun rimarkoj de M. Turková

REZOLUCIO DE LA 108-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 1 318 partoprenantoj de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Torino, Italio, inter la 29-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto 2023, traktis la temon “Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj“. La partoprenantoj, alvojaĝintaj el 69 diversaj landoj, ne nur diskutis la temon, sed spertis kaj vivis ĝin: ĉar ĉiuj partoprenantoj parolas la internacian lingvon Esperanto, neniaj lingvaj baroj malhelpis interkomunikadon kaj efektive, konforme al la kongresa temo, la homaj valoroj de ĉiuj ĉeestantoj kunfluis – en harmonia etoso.

Multaj esperantistoj raportis pri propraj spertoj kiel migrantoj. Ili emfazis, ke la scio de la lingvo Esperanto ja helpas por ricevi subtenon en la komenco de nova vivo, sed esenca estas la lernado de la nacia lingvo de la koncerna lando, por povi integriĝi en la socion.

Tio validas por ĉiuj migrantoj – ĉu ili libervole elektis translokiĝi al alia lando aŭ ĉu ili devis fuĝi el sia hejmlando pro milito, mizero aŭ persekuto.

Sekve, la kongresaj partoprenantoj notis jene:

1. La civila socio en la gastiganta urbo Torino donas modelan ekzemplon por la integriĝo de migrantoj kaj precipe rifuĝantoj en la socion.
2. Kun zorgo la kongresanoj konstatas, ke la nombro da rifuĝantoj en la mondo en la pasinta jaro unuafoje superis la ciferon de 100 milionoj. Ni avertas, ke pro la

klimatŝanĝiĝo pli kaj pli da homoj estos devigataj forlasi sian hejmon.

3. Ni alvokas ĉiujn ŝtatojn de la mondo ĉesigi la kaŭzojn de malvolonta migrado kaj ni subtenas la klopodojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la aliaj superŝtataj organizoj mildigi, se ne solvi la problemojn.
4. Ni apelacias al la ŝtatoj, kien venas rifuĝantoj, akcepti ilin kaj doni al ili ĉiun subtenon por povi establi memstaran, liberan vivon. Ni estas konvinkitaj, ke migrado fine rezultigas pli riĉan kulturon kaj pli bonstatan socion en tiuj ŝtatoj mem. Ni agnoskas la historian valoron de migrado – migrado estas bazo por la evoluo de la homaro.
5. Ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj garantii al migrantoj povi vivi sen lingva diskriminacio kaj sen ajna alia diskriminacio, alivorte: ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj sekvi la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj proklamitan en la jaro 1948.
6. Nun, en la jaro de la 75-a datreveno de la akcepto de la Deklaracio de Homaj Rajtoj, ni konstatas kun zorgo, ke tiuj rajtoj ne estas respektataj en multaj partoj de la mondo.
7. Tial ni estas solidaraj kun rifuĝantoj kaj ni emfazas, ke la Homaj Rajtoj estas universalaj rajtoj, kiuj validas por ĉiu individuo tutmonde, ankaŭ por migrantoj.

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 1118, 2023-08-05

Renkontiĝo en Hranice

La 5-an de aŭgusto estis invititaj esperantistoj al amika renkontiĝo, kiu okazis en la urbo Hranice kaj ĉirkaŭaĵo. La ĉefa celo estis la fama Abismo de Hranice.

La veterprognozo promesis al ni tuttagan fortan pluvon kaj malbonan veteron. La randevuo estis je la 11-a horo en la stacidomo de Teplice nad Bečvou, kiu mem estas interesa



konstruita en interesa stilo, kies parto estas posedaĵo de la urbo Hranice.

Tiu parto de la stacidomo funkcias kiel turisma inform-

centro kaj muzeo dediĉita al la abismo. En la informcentro eblas, pere de "3 dimensiaj" okulvitroj, provi se ni estus en la abismo: tre miriga sperto. Plie, ni povis spekti filmon, kie ni vidis, kiel laboras la spelelogoj, eksplorantaj la abismon. Oni devas nepre aldoni, ke ĝis nun esploristoj ne atingis la fundon kaj ke laŭ lastaj informoj estas la abismo 519 m profunda. Post vizito de la informcentro ni piediris ĝis rando de la abismo, ke ni povu vidi ĝin de supre. De ĉi tie ni iris piede tra arbaro al la urbo Hranice, kie ni renkontiĝis en restoracio „U Kramplů“ kun alia grupo de esperantistoj, kiuj ĉi tie jam atendis nin. Tie ni

babilis kaj kompreneble tagmanĝis kaj gustumis freŝan bieron. La kuraĝon iri al la abismo havis nur 8 personoj, do la restoracia grupo restis pli forta. Dank' al la familio Peyrouty el




Francio estis la renkontiĝo internacia. Ĉe la aranĝo entute partoprenis 22 personoj. Inter ili ankaŭ unu nevidanta handikapulo. La aranĝo estis preparita de amikoj de Esperanto en Hranice. Ni dankas al Ivan Potiška, nia ĉefa organizanto. Kaj la prognozo de la vetero estis tute malvera. Ni travivis agrablan tagon!

L. Hakl

Novajoj de la eldonejo KAVA-PECH

Lastan fojon mi prezentis al la legantoj de Informilo la novaĵojn de KAVA-PECH eldonitajn ĝis ilia prezentado en Olomouc la 11-an de majo. Sed ankaŭ post tiu evento mi diligentis, kaj kiel eldonisto, kaj kiel aŭtoro.

En Olomouc dum la prezentado de la traduko de Jan Duda *Sadako volas vivi!* mi promesis, ke mi laŭeble baldaŭ eldonos lian verkon *En la muziko estas la vivo de ĉeĥoj*. Tiun promeson mi plenumis kaj la enmarketigo kun la aŭtografado (ĉar Jan Duda ĉeestos) okazos en la Esperanto-muzeo Svitavy sabate la 9-an de septembro. La teksto estas bazita sur la prelego de la aŭtoro prezentita dum la UK en Prago en la jaro 1996. Ĝi koncize, tamen trafe, resumas la evoluon de la muziko en Ĉeĥio kune kun la priskribo de la plej elstaraj ĉeĥaj komponistoj sendepende, ĉu ili agis en Ĉeĥio aŭ eksterlande, fronte kun Smetana, Dvořák, Janáček kaj aliaj. Kiel titolon de la libro elektis la aŭtoro konatan citaĵon de la komponisto Bedřich Smetana.



Plia novaĵo estas novelaro *La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj*. Tio estas finalistaj noveloj de la Interkultura Novelo-Konkurso sub ĉefredaktado de François Bolduc.

La novelaro prezentas la rezulton de la konkurso: 37 finalistajn novelojn elektitajn inter 421 konkursaĵoj. Ĉiuj rakontoj estas prezentataj en Esperanto kaj ankaŭ en la originala lingvo, kiam ili estis verkitaj en alia lingvo (franca, itala, rusa kaj ukraina).

Fine mi revenu ankoraŭ al Olomouc. Tie mi prezentis mian verkon *Mia vivo kun Esperanto* kaj anoncis, ke post rekomendo de miaj amikoj mi preparas ankaŭ la ĉeĥan version. Ne temas pri traduko, ĉar alia celgrupo bezonas alian alpaŝon.

La libro havas jenajn partojn:

1. Vivo kun Esperanto – prezentas seriozajn, sed ankaŭ gajajn momentojn de mia vivo kun Esperanto
2. Elektitaj gazetaraj artikoloj kaj intervjuoj pri diversaj temoj, tamen ĉiam ankaŭ pri Esperanto
3. Specimenoj de la aldonaĵoj de KAVA-PECH laŭ temoj

Fine estas 4 aldonaĵoj:

- Kompleta gramatiko de Esperanto
- Kelkaj gravaj esprimoj paralele en Esperanto kaj en la ĉeĥa



- La Akademio de Esperanto – klarigo de ĝiaj rolo kaj praktika agado
- Rekomenditaj retejoj pri pliaj informoj pri Esperanto kaj movado ĉirkaŭ ĝi.

La verko estas miaflanke finita, nun ĝin finpreparas la grafikisto kaj mi esperas, sed ne certas, ke mi povos ankaŭ ĝin jam prezenti dum la renkontiĝo en Svitavy de la 8-a ĝis la 10-a de septembro. Se ĝi ne estos presita, do certe dum la konferenco de ĈEA en Prudká de la 28-a de septembro ĝis la 1-a de oktobro.

Kompletan oferton de mia eldonejo vi trovos ĉe <http://kava-pech.cz>.
Petro Chrdle, chrdle@kava-pech.cz

UEA sukcesas ĉe Erasmus+

Universala Esperanto-Asocio (UEA) anoncas la aljuĝon de administra subvencio per la programo Erasmus+. Tio kovras trijaran periodon, cele al plivastigo de la prioritatoj de la Asocio, kongrue kun la temoj de la programo Erasmus+. La projekton orientas ampleksa laborplano, kiu referencas al la laboroj de la Komitato ĉe la montreala Universala Kongreso. La jaroj ricevas propran temon, por krei specifan fokusan direkton dum la projekto progresas:



2023: Jaro de daŭripova evoluo



2024: Jaro de interkultura kompetento



2025: Jaro de cifereca kompetento

La projekto fokusiĝas pri tiuj temaj aktoj por plifortigi la agadojn de UEA kaj krei sinergiojn kun iniciatoj landaj kaj lokaj. Por la jaro 2023, € 140 000 estis aljuĝitaj, dum por postaj

jaroj la sumo dependos de la agadraportoj kaj de la kvanto da dungitoj. Tiu ĉi sukceso kronas strategian agadon de UEA rilate al la programo Erasmus+, kiu komenciĝis en 2020. UEA ankaŭ kunordigas partneran projekton en la kadro Erasmus+, pri daŭripova transporto, kun aparta fokuso al trajnoj kaj bicikloj, kunlabore kun sia faka asocio IFEF kaj kun la faka asocio de TEJO, BEMI.

UEA partneras en pliaj projektoj: unu pri inkluziveco de blinduloj en Esperanto-agado, kunordigata de la Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj; unu pri interkultura kompetento, kunordigata de Itala Instituto de Esperanto; krome, tria projekto, kiu ĵus komenciĝis, temas pri subteno al rifuĝintoj el Ukrainio, kunordigata de Bjalistoka Esperanto-Societo. Ĉiu partnera projekto havas buĝeton je € 60 000.

UEA ĝojas pri aljuĝo de tiu ĉi grava subvencio; ĝi estas optimisma pri la sukceso kaj entuziasme rigardas al la estonteco por krei pli inkluzivan, interkulturan, kaj ciferecan movadon ene de sia tutmonda komunumo. Por pliaj informoj pri la projekto: vizitu nian retpaĝon ĉe www.uea.org.

Koncizigita el Gazetara Komuniko de UEA

MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA ESPERANTO-TAGO

26 JULIO 2023

En Varsovio tiun tagon en la jaro 1887, Ludoviko Zamenhof publikigis la unuan malgrandan libron, kiu skizis lian novan internacian lingvon, Esperanton, kiu celis roli kiel relative facila dua lingvo por ĉiuj homoj tra la mondo. La lingvo de d-ro Zamenhof estis baldaŭ alprenita de internaciistoj ne nur en

Pollando kaj najbaraj landoj, sed en Ĉinio, Japanio, Brazilo kaj multaj aliaj landoj. El modesta komenco ĝi kreskis en internacian movadon, kiu helpis antaŭenigi pacon, kunvenigis profesiulojn en multaj fakoj, kaj evoluigis siajn proprajn literaturon kaj intelektajn interŝanĝojn. Kelkajn tagojn post la supra dato la 108-a ĉiujara Universala Kongreso de Esperanto malfermiĝis en Torino, Italio. Pasintjare la kongreso okazis en Montrealo, Kanado; venontan jaron ĝi okazos en Aruŝo, Tanzanio. Esperanto estas konata elemento ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj ĝiaj klopodoj por antaŭenigi kompreniĝon estas rekonitaj de Unesko. Universala Esperanto-Asocio konsideras la agnoskon de homaj rajtoj kiel esencan fundamenton de sia laboro. Ĝi kunlaboras kun ĉiuj homoj kaj organizoj de bona volo, kiuj celas realigi pli pacan kaj daŭripovan mondon bazitan je internacia kompreniĝo kaj kunlaboro. Feliĉan Esperanto-tagon!

El la Gazet. Komun. de UEA

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21, 530 03
PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970
e-mail: aeh@esperanto-ah.eu interreto: www.esperanto-ah.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ352010000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.